

Nobiles Christi

Brevier-Himno

Komunaj tekstoj > pluraj virinoj > matena laŭdo

*Nobiles Christi famulas diserta
voce cantemus, decus æmulatas
feminæ fortis, sacra cui profudit
pagina laudes.*

*Non eas mundus laqueis revincit,
iussa quæ Patris subeunt volentes,
ut bonum Christi satagant ubique
spargere odorem.*

*Edomant corpus, precibusque mentem
nutriunt sanctis; peritura temnunt
lucra, ut inquirant sibi permanentis
præmia vitæ.*

*Sit Deo soli decus et potestas,
laus in excelsis, honor ac perennis,
qui suis totum moderans gubernat
legibus orbem.*

Amen.

Lerte ni kantu pri virinoj noblaj,
ili imitis la edzinon fortan,
kiun prikantas unu tuta paĝo
en la Biblio.

Ilin per retoj mond' ne povis teni,
ĉar ili sin subigis al la Patro,
sternis abunde ĉie la odoron
bonan de Kristo.

Ili ignoris gajnon pereontan,
nutris la menson per preĝado sankta,
bridis la korpon, ĉiam nur serĉante
vivon en gloro.

Al Dio sola estu la potenco,
laŭd' en la altoj kaj honor' eterna,
ĉar Li per siaj bonaj sanktaj leĝoj
regas la mondon.

Amen.

latina T: Franciscus Reuss CSSR († 1924)

E: Albrecht Kronenberger 2008